2-a Jaro, N-o 16 (68)

APERAS S.A.T. SEMAJNE

14. Januaro 1926

ESPERANTO JE LA SERVO DE L' TUTMONDA PROLETARO

SENNACIULO

OFICIALA ORGANO DE SENNACIECA ASOCIO TUTMONDA

Sidejo de la Redakci-Komisiono: Colmstrasse 1, Leipzig-Stötteritz (Germ.) | Sidejo de Ekzekutiva Komisiono de SAT 23, rue Boyer, Paris XX | Administranto: R. LERCHNER Colmstrasse 1, Leipzig-Stötteritz

Dekadenco de la germana kapitalismo

La germana kapitalismo staras antaŭ tre akra krizo. Dum la lastaj du jardekoj ĝi jam devis suferi du pli gravajn krizojn, kiuj treege skuis la kapitalistan sociordon en Germanio. La popolmortigado 1914 ĝis 1918 estis la unua krizo, kaj la dua estis la inflacio en la jaro 1923.

Fine de la popolmortigado, do la 9. novembron 1918 okazis revolucio en Germanio. La politika potenco estis en la manoj de la proletaro. Sed la germana proletaro ne spertis tenadi la potencon en siaj manoj, pli kaj pli la kapitalismo reakiris la potencon super la laborularo. La germana proletaro estis tre demokrata, ne nur tre, sed tro demokrata. Al ĝi mankis spertoj, kiel la proletaro devas teni sian proletan potencon. Do la revolucio postmilita en Germanio estas kvazaŭ nuligita. Restis ĝis nun nur ankoraŭ la revolucia mantelo, la "demokrata" respubliko, gvidata de la nacionalisto kaj fame konata amasmortigisto Hindenburg.

La venko ŝajna de la unua krizo estis samtempe la kaŭzo por nova krizo financa. Komenciĝis la inflacio. Hodiaŭ valoris ankoraŭ la marko, morgaŭ oni jam ne plu ricevis ion por ĝi. Aperis la centmarkaj monbiletoj. Sed kiam la proleto ricevis ĝin kiel salajron, li jam bezonis milmarkajn monbiletojn. Kaj dum la daŭro de kelkaj monatoj la germana mono tiel senvaloriĝis, ke en oktobro 1923 la germanoj estis senescepte bilionuloj. La laboristo gajnis 25—50 bilionojn da markoj, kiuj nature malpli valoris ol antaŭ la milito 10—20 markoj germanaj. Dum la inflacio, en la jaro 1923 okazis kelkaj revoluciaj bataletoj. Sed kvankam la germana proletaro ege suferis sub la tiamaj cirkonstancoj, gi ne komprenis aliĝi al batalfronto kontraŭ la bankrota kapitalismo. Sekvis multaj arestoj, mortpafadoj ktp. Kaj per plej kruelaj rimedoj la germana kapitalismo ree sukcesis savi la nunan sociordon. Do ankaŭ la dua krizo de la germana kapitalismo estis sufiĉe danĝera por ĝi. Nur mankis la aktiveco de la laborularo, kaj la kompreno por la neceso de la klasbatalo.

Sed jam proksimiĝas nova krizo. Pli ol 7000 politikuloj en la karcero, la plej aktivaj revoluciuloj, sed tamen tiu nova krizo. Do ni vidas el tio, ke la kapitalistaro ne plu sukcesas, plene ordigi sian sociordon, forigi la kaoson en la produktado. Eĉ la amerika pruntopago de milionoj da markoj al la germana "kapitalistaro" ne helpas. La plena dekadenco estas evidenta.

La nova krizo ne nur estas financa, sed samtempe produktada. Kion signifas tio? La germana proletaro ne havas plu sufiĉan aĉetforton, kaj sur la mondkomercejo la germanaj produktaĵoj estas tro multekostaj, kvankam la salajro de la germana laboristaro ne estas pli alta ol tiu de la alilandaj laboristoj. Stranga stato, sed tamen fakteca. Do mankas nun la vendeblecoj de la produktaĵoj germanaj, la provizejoj estas plenaj de nevendeblaj produktaĵoj. Multaj laborejoj jam estas parte aŭ tute haltigitaj, ili ne plu produktas.

Nature ankaŭ kaŭzis tiun staton parte produktadsabotado flanke de la entreprenistoj, ĉar ili ne plu gajnas tiom multe kiel antaŭe. Ili estas kutimaj produkti kun granda profito.

La nombro de l' senlaborularo ĉiutage pli ampleksiĝas, kaj komence de tiu ĉi jaro oni jam nombras proksim. 1 500 000 senlaborulojn en Germanio. Nature ili nun estas ankoraŭ pli malfortaj aĉetantoj, ĉar la senlaborula subteno ŝtata estas tiom malalta, ke ĝi almenaŭ sufiĉas por la plej necesaj manĝaĵoj. Do la produktada krizo ankoraŭ devas pli akriĝi.

Jam en multaj lokoj nun okazas pli aŭ malpli gravaj ribeloj. Ne nur ribelas la konsciaj laboristoj, sed ankaŭ la ĝis nun senkonsciaj proletoj rimarkas, ke la nuna stato estas tre danĝera ankaŭ por ili. Ili vidas la mizeron, la suferojn, la disfalon de la kapitalista sociordo. Kompreneble mankas al ili ankoraŭ nun la kompreno por la neceso de revolucia klasbatalo, almenaŭ parte. Sed la cirkonstancoj zorgos, pri ilia pli aŭ malpli frua ekkono, ke ili nur per propraj fortoj atingos nuligi la nunan krizon. La klasbatala fronto de la germana proletaro konstante ricevas novajn anojn, do la batforto de ĝi pli kaj pli kreskas.

Ĉar ne estas atendebla baldaŭa ŝanĝo de la nuna stato en Germanio, male, la krizo pli akriĝos, ankaŭ la revolucia ondo kreskas. La bataletoj fariĝos bataloj, kaj ne estas escepte, ke nova kaj pli efika revolucio germana finigos tiun krizon. Sed kiam tio okazos, kio ŝajnas esti tre verŝajna, tiam tiu batalo ne nur estu nacia, sed ĝi estu internaci-revolucia batalo. Tiuj linioj nur estu la enkonduko. Sed post kelkaj semajnoj la situacio certe jam tiel akriĝis, ke ni povos pli detale priskribi la farendaĵojn, kaj precipe niajn taskojn kiel Sennaciuloj revoluciuloj.

Ni preparu nin por nia finfina venka batalo tutmonda! —*r.*

Italio

Jam estis plene aprobita kaj funkciigita aŭ baldaŭ funkciigota tuta aro da t. n. "fŝegaj leĝoj", t. e.:

1. La leĝoj priparolitaj en n-oj 37 kaj 42 de "Senn.".

2. *Pri la komunumestraro.*

Ĝis nun, ĉiuj (eĉ malgrandaj) komunumoj estis administrataj de konsilantaro, elektita de la komunumanoj; la konsilantaro mem elektis sian estron (itale: *Sindaco,* elparolu *sindako*) kaj liajn helpantojn (itale: *asfesfori*). Laŭ la nova leĝo, tio valoras nur por la komunumoj havantaj pli ol 5000 loĝantojn: sed en la pli malgrandaj, la tuta administrado apartenas al la t. n. "*podestá*" (laŭvorte: "poveculo"). Ĉi tiu oficisto deĵoras senpage (krom esceptoj), kaj dependas de la registaro: nur konsile (t. e. ne decidrajte) helpas lin konsilantaro, elektita de la provincestro (t. e. de la registaro) laŭ difino de lokaj ekonomiaj asocioj. Sed la elekto de tiu konsilantaro ne estas deviga; kaj la provincestro mem rajtas difini, kiaj ekonomiaj asocioj povu antaŭdifini ĝiajn anojn.

La registaro rajtas agi sammaniere rilate la pli grandajn komunumojn, kiam ilia konsilantaro estis eksigita dufoje dum du jaroj.

3. *Pri la sindikatoj.*

La tuta leĝo estas tre longa kaj detala: sed ĝia efektiva kerno estas, ke nur unu sindikataro rajtas funkcii. Ĉiuj laboristoj kaj mastroj — ĉu anoj de la sindikato, aŭ ne — estas devigataj interrilatiĝi nur pere de ĝi, kaj pagi ĝian kotizon. Tiuj sindikatoj estas kontrolataj de la registaro. La aliaj sindikatoj rajtas nur ekzisti, sed kompreneble ne povas funkcii. Pri ĉiuj kontraktaj malpacoj inter laboristoj kaj mastroj, juĝas devige aparta ŝtata juĝistaro: tial strikoj kaj lokaŭtoj estas malpermesataj.

Ĉar oni akceptas nur la sindikatojn "kies estroj havas certan *nacian* kredon", kaj kies regularo postulas, ke ĉiuj anoj havu "bonan politikan konduton laŭ la *nacia* vidpunkto", tial oni tuj komprenas, ke la "nure akceptita sindikataro" estos la fŝ-a.

4. *Pri la ministrestro.*

Tre mallongigite: la ministrestro — kaj, pere de li, la tuta ministraro — respondecaj al la reĝo, sed ne (pliĝuste: preskaŭ tute ne) al la parlamento: tial, oni ne povas devigi lin eksiĝi per deputitara "malkonfida voĉo". Ĉiu ulo, provinta malhelpi la vivon, la bonstaton, aŭ la liberecon de la ministrestro, estas punota per 15-jara karcero, kaj se li sukcesis, per vivdaŭra: ĉiu, vorte aŭ age ofendinta lin, ricevos 6 ĝis 30 monatan malliberigon, kaj monpunon de 500 ĝis 3000 italaj liroj.

5. *Pri la civitaneco.*

Ĉiu italo eksterlande aginta tiel, ke okazu enlanda malpaciĝo aŭ malhelpo por la italaj profitoj, aŭ malbonfamigo de nia nacio, perdos siajn civitanecrajtojn: en plej gravaj okazoj, oni eĉ konfiskos lian havaĵon.

La sama leĝo valoras rilate tiujn, kiuj el Italio skribas eksterlanden, tiel ke okazu ĉio supredirita.

6. *Pri la pensioj.*

La leĝoj rilatantaj la promilitaj pensioj, valoras ankaŭ rilate la mortintojn "por la nacia kaŭzo" de 1. 7. 1919 (starigdato de la fŝoj) ĝis 1. 11. 1922 (marŝo al Romo).

7. Iuj aliaj plimalgravaj leĝoj estis ankaŭ aprobitaj. *Sennomulo.*

Ni petas ĉiujn eksterlandajn gek-dojn ke ili bonvolu **ne** skribi al ni pri politikaĵoj.

La italaj gek-doj

Popola voĉdonado en Svisio pri enkonduko de l' pormaljunula kaj porposteula asekuro

La 5. ĝis 6. dec. 1925 la svisa popolo per 406 063 voĉoj kontraŭ 213 853 decidis enkondukon de nova artikolo "34 guater" en la federalan konstitucion. La nova artikolo tekstas jene:

"*La svisa konfederacio enkondukos per leĝo la pormaljunulan kaj porposteulan asekuron; ĝi estas rajtigata enkonduki pli malfrue ankaŭ la invalidasekuron.*

Ĝi rajtas deklari deviga ĉi-tiujn asekurbranĉojn ĝenerale aŭ nur por certaj klasoj de l' loĝantaro.

La administrado okazas per kunhelpo de la kantonoj; povas esti altirataj publikaj kaj privataj asekuroj.

Ambaŭ unuaj asekurbranĉoj estas enkondukendaj samtempe.

La financaj (pagoj) de la konfederacio kaj de la kantonoj kune ne devas esti pli altaj ol la duono de la tuta bezonaĵo de l' asekuro.

Depost la 1. jan. 1926 la konfederacio pagas kiel kotizon ĉiujn enspezojn el la fiska ŝarĝo de l' tabako.

La puraj enspezoj de la konfederacio el estonta ŝarĝo de l' brando estos uzataj por la maljunula — kaj posteula asekuro."

Tio estas do la fundamento por fabrikota leĝo, kiun nia financministro Musy intencas prezenti al la parlamento plej eble malfrue, ne antaŭ 5—6 jaroj. Tion li komprenigis al la parlamento. Oni parolis jam pri jara rento da 400 fr., kiun ricevus nur la 70 jar- kaj pliaĝaj maljunuloj. (Kiom da laboristoj atingas tian altan aĝon?) Sed ĉi-detalojn enhavos la estonta leĝo kaj sekve ĉio dependos de tio, kiom progresos ĝis tiam la maldekstrulaj partioj.

Mi memorigu ankoraŭ, ke ne jam 1 jaro estas pasinta (25. majo 1925) kiam ankaŭ laŭ popola voĉdonado per plimulto da 100 000 voĉoj la t. n. "iniciativo Rothenberger" estis forĵetita. Tiu iniciativo, produkto de timego en 1918 j. pro ĝeneralstriko, volis tuj depreni de la produkto de l' militimposto 200 aŭ 250 milionojn da fr. por tuja efektivigo de l' sociaj asekuroj. La kapitalista bandaĉo tiam venkis kaj ni devis do ĉi-foje fari la eblon por almenaŭ certigi la fundamenton de l' sociaj asekuroj.

K. D. 3477.

Kultur-laboro en profligoj de BSSR

(Verkita nur speciale por "Sennaciulo")

A. Ŝilin (Daŭrigo)

Ĝis 1. nov. de la nuna jaro en BSSR estas 138 mil. membroj de profesiaj ligoj (sindikatoj). Sed industrio kreskas. Rekonstruiĝas detruitaj fabrikoj, oni konstruas novajn bienlaboristojn, kiuj antaŭe estis ekspluatataj, nun ĉiutage aliĝas al profligo "Laboristoj de l' tero kaj arbaro". Kaj profligoj (sindikatoj) kreskas en nombro (je lasta jaro ĝi pligrandiĝis pli ol 12 miloj da membroj), organize plifortiĝis profligoj kaj disvolvigas kultur-klerigan laboron, ankaŭ kreskas kulturklerigo de laboristaro.

Estas diversa kaj multfaceta profliga laboro disvolvi sian laboron por plibonigi ekonomian staton kaj kulturan de la laboristaro profligoj de BSSR.

Diversa estas kultura laboro en profligoj: politikedukado, profesia propagando, likvido de analfabeteco, scieco, sporto, ruĝaj anguletoj, laboristaj kluboj ktp. Ĉio estas nova, ĉio aperis nur post revolucio aŭ nur ĉe sovetpotenco. Rusa caro, fabrikposedanto, terposedanto timis, se popolo estos kultura kaj klera. Senlegoscieco, senkultureco estis iloj, kiuj kaŭzis ne nur politikan sed ankaŭ ekonomian premon. Celon al lumo, al scio oni batis per skurĝoj, forĝis en ĉenoj, dronigis en brando, dispafis sed neniigi tute ne povis.

Post oktobro, larĝa reto de kluboj, lernejoj, bibliotekoj, domoj por legado kaj aliaj kulturklerigaj organizaĵoj kovris tutan Sovetlandon. Nek civita batalo, nek malfacila ekonomia situacio povis reteni tiun kreskon. Kultura fronto disvolviĝis, fronto de batalo kontraŭ mallumaj flankoj de l' estinto, kontraŭ malnova moraro, kontraŭ senlegoscieco, nekultureco, disvolviĝis tiam, kiam laboristo donis ŝraŭbpafilon el dekstra al maldekstra mano, prenis martelon en sian manon kaj komencis konstrui unuan en mondo proletaran regnon — matene, kaj kun analfabeto, kun krajono kaj legolibro politika laboris vespere.

Blankrusaj laboristoj pli malfrue ol rusaj laboristoj komencis sian trankvilan vivon. Sed post 5jara laboro profligoj por rekonstruado industrion kaj mastrumadon, ĝi ankaŭ disvolvis kulturklerigan laboron.

Unue — laborista klubo. Malgraŭ tio, ke laboristoj havis malgrandan monsumon, klubkonstruado larĝe disvolviĝis kaj kreskas. En nuna tempo en BSSR ekzistas 248 laboristaj kluboj profesiaj nur (ne partiaj aŭ junularaj) kun 24412 membroj. 108 el ili estas organizitaj en vilaĝoj, sovetaj mastrumadoj por estintaj bienlaboristoj kaj nunaj mastrumadaj sovetaj laboristoj.

Preskaŭ 20000 membroj en kluboj okupas sin en iu rondeta laboro (je 50 % en politikaj, profesiaj, sciencaj, sportaj k. a. rondetoj.

Fundamenta laboro — estas amasa laboro, kiu konsistas en tiu, ke oni organizas vesperojn de raportoj, spektakloj, familiaj vesperoj, vesperoj de demandoj kaj respondoj, kino-vesperoj ktp. Nun multe disvastigitaj estas vivaj gazetoj — kantoj kaj kantetoj je politikaj kaj moraj temoj.

Biblioteka laboro pligrandiĝis. La 1. jan. 1925 ni havis 174 bibliotekojn, nun profligoj havas 589 bibliotekojn kun 20796 libroj. Krom tio ekzistas 278 rondirantaj bibliotekoj (moveblaj trad.) kun 17925 libroj. Tiuj ĉi bibliotekoj estas pli ĉe laboristaj amasoj.

Sportmovado progresas nur depost 2 jaroj. Ĝi 1. jan. 1925 estis 98 rondetoj kun 2500 membroj; la 1. nov. jam estas 146 rondetoj kun 5596 membroj.

Estas tre malfacile en unu ĵurnala aŭ gazeta artikolo skribi pri ĉiuj flankoj de kulturlaboro en profligoj. Necese estas ankoraŭ diri pri murgazetoj, pri likvido de senlegoscieco, pri profteknika klerigado, pri laboro inter virinoj, inter junuloj, infanoj, pioniroj, pri meminstruadaj rondetoj ktp. ktp. Fine pri tiu granda laboro, kiu kondukas profligoj en kondiĉoj ekzistadon en BSSR — 4 naciajn inter profliganoj.

Je ĉiu parto de kulturfronto profligoj faras grandan laboron kaj havas grandajn atingojn. Tre malfacile estis komenci kaj disvolvi laboron. Sed faris multe: rekonstruas industrion kreskas produktiveco de laboro, plibonigas ekonomian staton de laboristaro, kaj vilaĝanaro kreskas, kiel pompa floro, — proletarian kulturon kaj krekapablon.

De centjara dormo vekiĝis blankrusa popolo, por per siaj propraj manoj forĝi feliĉon por si, irante vojon al komunismo — al tutmonda frateco kaj unueco de laboristaro kaj premintaj ĉiujn landojn.

Tradukis *Dim. Snejko.*

Nov-Zelando

Antaŭ la elektado, kiu okazis la 4. novembro en Nov-Zelando la parlamento enhavis:

Deputatojn	
Konservativoj	39
Liberaloj	23
Laboristoj	17
Alia	1

Poste		Voĉoj
Konservativoj	55	295705
Laboristoj	13	173743
Liberaloj	9	127845
Aliaj	3	31240
		628535

Du el la laboristaj deputatoj estas en danĝero, ĉar ankoraŭ mankas kelkaj voĉoj de maristoj por la fina kalkulado.

Nov-Zel. enhavas loĝantaron 1300000. Kaj ĉiuj viroj kaj virinoj, kiuj havas aĝon de 21 jaroj estas voĉdonrajtaj.

Antaŭ 2—3 semajnoj en la malliberejo de ĉi-tiu urbo (Auckland) estis 250 strikantaj britaj maristoj. Ho ve, la striko malsukcesis. *1284*

Atakego kontraŭ la radikaluloj en usonaj profunuiĝoj

Dum la lastaj du jaroj, kompare nova fenomeno naskiĝis en la amerika laboristmovado. Ĝi estas la eksigo de membroj el la profunuiĝoj, pro iliaj opinioj politikaj kaj pro agado konforma al tiuj-ĉi opinioj. En la estinteco okazis multaj luktoj inter la reakciularo kaj la revoluciularo de la movado kaj ega maldolĉeco regis inter la du frakcioj. Sed preskaŭ neniam la eksigbatalilo estis uzata ĝenerale je tiuj-ĉi luktoj, escepte en okazoj, kiam eksiĝo de tutaj organizaĵoj estis admonata, kaj eĉ tiaj estis, en multaj okazoj, pardonataj. Ĝenerale la batalo estis nur buŝa, ne gravas, ĝis kioma grado da maldolĉeco ĝi atingis.

Sed, kiel dirite, dum la lastaj du jaroj la eksigado de membroj el la unuiĝoj kaj rezulte eĉ el iliaj pozicioj, iĝis rigardata kaj aplikata kiel ordinara batalilo kontraŭ la radikala flanko.

La profunuiĝo, kiu meritas la honton esti la unua, kiu aplikis eksigon kontraŭ la radikala flanko, estas la Internacia Unuiĝo de Sinjorinaj Vestaĵ-Gelaboristoj, (International Ladies Garment Workers Union); ĝi komencis la fiagadon antaŭ du jaroj sub la estreco de Morris Sigman. Ne povante venki la revoluciularon alimaniere, Sigman, helpata de sia lakeo Perlstein, pensis, ke li povas liberiĝi je ili elpelante ilin el la unuiĝo. Brute li eksigis multajn el la gvidantoj-revoluciuloj el la organizaĵoj en Ĉikago, Filadelfio, Kliveland kaj aliaj lokoj, nur pro membreco en la Ligo Edukeca por Profunuiĝoj (Trade Union Educational Leagne).

Tiu detrueca taktiko de Sigman ricevis la benon de Gompers ĉe la Portland kunvenego de la Amerika Federacio de Laboristaro en 1923, kie kun la plej grandioza scenaĵo kaj je la plena lumaĵo publikeca, li eksigis William F. Dunn el la kunvenego. Dunn estis regula delegito de la Silver Bow, Montana, profunuiĝ-konsilantaro kaj la sola akuzo kontraŭ li estis, ke li aprobis Komunismon.

La eksigo de Dunn estis kvazaŭ signalo en la profunuiĝa movado por ĝenerala uzado de la eksig-batalilo kontraŭ la kreskanta "maldekstra alo", kaj la reakciuloj sufiĉe rapide sekvis la ekzemplon.

Lewis en la ministra unuiĝo uzis draste tiun metodon. Li tuj senleĝigis la T. U. E. L. nomante ĝin duala unuiĝo kaj eksigis Tom Myerscough kaj aliajn minist-gvidantojn. Li kvazaŭ krucumis la batalantojn de la kanada distrikto. Farrington de Illinois sekvis tiun ĉi agon eksigante Thompson, Watt kaj aliajn. Tra la tuta organizaĵo estas komencita terur-reĝimo kontraŭ la "maldekstra alo" kaj ĉiu ĝies signo estis "subteren" pelita je eksig-minaco.

Hutcheson de la ĉarpentistoj, ne dezirante esti superata de sia kunulo Lewis, eksigis du trionojn de sia organizaĵo en Detroit pro ĝia simpatio al la T. U. E. L. En Los Angeles, kun polica helpo, li liberiĝis de pluaj radikaluloj. Kaj lia lastago estis, malpermesi, ke Rosen estu delegito de nov-jorka distrikto, ĉar tiu estis kandidato de "maldekstra alo" por lia ofico.

El la elektrik-laborista profunuiĝo multaj batalantoj estis eksigitaj, kaj en la pentrista unuiĝo la sama intenco estis montrita, ĉar ĉe ĝia lasta kunvenego amendo estis akceptita, kiu postulas eksigon de "membroj de Kom. Partio, kiuj opozas la principojn de la A. F. de L."

Multaj centraj laborist-konsilantaroj ankaŭ ekkomencis la eksig-metodon kontraŭ la radikaluloj-delegitoj. La plej akraj el ili estas en Minneapolis, Seattle kaj Los Angeles. Estas notinde, ke tiuj urboj estas la kvazaŭ "maldekstra flankaj" fortikaĵoj. La kialo pro la akra apliko de la eksig-metodo en tiuj lokoj estas duobla; unue, la neceseco de la burokrataro, batali la "maldekstran alon per ĉiuj rimedoj ĉe sia dispono, kaj, due, la ĉeesto de ĉiuspecaj ekssocialistoj, kiuj estas la plej deziremaj kaj senkonsciencaj iloj en la manoj de la reakciuloj.

Kio estas la bazo de tiu eksig-metodo, kiu estas nun tiel akre uzata kontraŭ la "maldekstra alo"? La kaŭzo devenas de du radikoj. La unua estas trovebla en la plibonigita batal-metodo de la radikaluloj dum la lastaj du jaroj, kio devigas la reakciulojn al pli drastaj batal-metodoj. La dua estas trovebla en la turniĝo de la laborist-burokrataro, pli akre ol iam ajn, al klas-kunlaborado, kio, sia flanke, malfortigas ilian kontrolon de la masoj laborulaj, kaj kio devigas ilin al la neceseco nuntempe detrui la influon de la "maldekstra flanko" je ĉiu kosto, senrigarde al la metodoj uzotaj.

La kunveno okazanta nun (dec. 12.—25.) de la Internacia Unuiĝo de Sinjorinaj Vestaj-Gelaboristoj en Filadelfio estas la unua en la historio usona, kies delegitaro reprezentas 70 % de radikalularo kaj 30 % de reakciularo. Sed, bedaŭrinde, pro la Prusio-simila (antaŭ-milita) voĉdonsistemo la reakciaj delegitoj nombras 265 kaj la radikalaj 112. Sed Sigman kaj liaj satelitoj bone scias, ke ili devas retrovu, ĉar la masoj, kiuj voĉdonis por tiuj 112 delegitoj estas klaskonsciaj kaj mem veturas al la kunvenego por subteni siajn reprezentan(tin)tojn — (aŭ ĉu eble ankaŭ por kontroli ilin?

Mi vidis antaŭ kelkaj tagoj 4 omnibusojn, kiuj entenis pli malpli 200 de tiuj klaskonsciaj gejunuloj, kiuj, elektis vojaĝi je malbona vetero 4—5 horojn ĉiudirekte por gardi siajn komunajn interesojn. Ili ĉiuj kutimas iri teatrojn, dancejojn kaj aliajn amuzlokojn.

Sed oni ne estu tro optimisma pri la ĝenerala laborist-movado uzona, ĉar la supre nomataj gekamaradoj — kvankam ili reprezentas unu el la plej grandaj profunuiĝoj usonaj (ĉirkaŭ 90000) — ne reprezentas la larĝmasan animstaton ĉi tiean. Ili preskaŭ ĉiuj estas alilanduloj — kaj la granda plimulto estas hebreoj.

Georgo Saville (1092)

Kunsido de l' ekzekutiva komitato de I. T. F.

La 26. kaj 27. novembro okazis en Amsterdam la kvaronjara kunsido de la E. K. Ĉeestis la membroj: C. T. Cramp (Anglio), prezidanto, J. Döring (Germanio), M. Bidegaray (Francio), R. Bratschi (Svisio) kiel anstataŭanto por A. Forstner kiu malsaniĝis, Ch. Sindlay (Svedio), ambaŭ membroj de la holanda oficejo, J. Brautigam kaj P. Moltmaker, kaj ambaŭ sekr. — Oni priparolis funde la raporton pri aktiveco de la pasintaj kvar monatoj kaj aprobis ĝin unuvoĉe. La akceptpeto de la "National Sailers' and Tiremen's Unio Grandbritio" kaj de la "Federacio Obrera de Tenerife" (transportlaboristoj, motoristoj, kaj maristoj)" estis principe aprobata. — Laŭ decido la sekvonta kongreso de la I. T. F. okazos dum septembro 1926 en Paris. — La peton de la maroficiroj rilate kunlaboradon oni ĉefe aprobis. La findecidon transprenis la konsilantaro de l' marista sekcio.

Plue regis interkonsento, sendi delegiton al la sindikat-konferenco de la balkanlandoj okazonta dum marto 1926 verŝajne en Sofio invitota de Internacia Sindikata Asocio. — La konduto de la faŝista registaro en Italio kontraŭ moderna sindikatmovado estis tre detale priparolita kaj rezultiĝis la decido ĉiamaniere helpi al la kamaradoj italaj kaj klopodi tre I. G. B. instigu ĉiujn laboristojn organizitajn komune kunbatali kontraŭ faŝismo. —

Fine generala konsilanto G. Sardelli estis nomata kiel sekretario kaj gvidanto de la tramista sekcio. *I. T. F.*

≡ DISKUTEJO ≡

Pri cionismo

Ĉu SAT-ano rajtas defendi ŝovinismon?

Efektive, tiun demandon mi devas submeti al la legantaro de "Sennaciulo", post legado de la polemiko de k-do Sonnenfeld[1]) kontraŭ mia kontraŭcionisma artikolo.[2])

En mia jus menciita artikolo mi demandis: Ĉu SAT-ano povas esti cionisto? Kaj per sufiĉe klaraj argumentoj mi montris, ke cionismo kaj SAT-aneco estas du konceptoj sin reciproke ekskludantaj kiel fajro kaj akvo. Same kiel ŝovinisto alinacia ne povas esti ano de SAT, cionisto ne povas esti membro de nia asocio.

Sed jen venas protestante k-do Sonnenfeld. Al li ne plaĉas la kondamno de cionismo flanke de sennaciulo, kaj li defendas cionismon, dirante, ke estas "malbona kutimo de l' SAT-anoj ĉion prijuĝi kaj kondamni tuj en la unua momento *starante sur ideologia bazo de sennaciismo* kaj *socialismo.*"

Permesu, k-do Sonnenfeld, ke mi ĝojas pri tiu "malbona kutimo" de SAT-anoj. Ĉu vi eble preferas, ke SAT-anoj ĉion prijuĝu starante sur ideologia bazo de *naciismo* kaj de *kapitalismo?* Certe, en Sennaciujo oni juĝas sennaciece, oni kondamnas ĉian naciemon, ĉar naciemo disigas la homaron, plifaciligas imperialistajn militojn, ĵetegos nin ĉiujn en plej teruran abismon. *Se vi ne kondamnas, se vi ne permesas kondamni naciemon, kiel vi povas vin nomi "sennaciulo"?*

K-do Sonnenfeld min kulpigas, ke mi ne sufiĉe zorgeme studadis la cionistan movadon antaŭ ol ĝin prijuĝi. Vi eraras, k-do Sonnenfeld. Mi ne nur aŭdis en viena esp.-societo la longan paroladon de la esperantisto cionista, paroladon, kiu estis tiel ŝovinista, ke unu de la ĉeestantaj sennaciuloj, ĝin aŭdinte ekforkuregis pro kolero en la stratojn por trankviliĝi, kaj ke la aliaj, ne forkurintoj, ege miris aŭdi tiajn prapatrajn argumentojn el la buŝo de moderna homo. Krome, mi ĉiutage atente studis en la viena organo cionista la raportojn pri la kongreso cionista okazinta dum aŭgusto en Vieno. Kaj la paroladoj de tiu kongreso pli valoras ol la libro de Holitscher, kiun citas k-do Sonnenfeld. K-do Sonnenfeld diras, ke la judoj ne estas reganta nacio en Palestino. Fakte tie regas brita kapitalo, sed favorigante la hebreojn, ĝi tie volas krei kontraŭpezon kontraŭ la araba plimulto. Ĉu k-do Sonnenfeld forgesis, kiun grandan tumulton provokis je la cionista kongreso la fakto, ke la brita imperialismo nomis necioniston kiel reganto de Palestino? Per kia rajto la hebreoj, kiuj estas nur malplimulto en Palestino, postulis ke la reganto estu el iliaj vicoj aŭ almenaŭ proksima al iliaj idealoj? Kaj ĉu k-do Sonnenfeld povas nei, ke al la cionista kongreso multaj parolintoj plendis pro tio, ke la granda plejmulto de la ĝis nun al Palestino senditaj hebreoj ne apartenas al la produktantaj profesioj, sed estas plejparte komercistoj? Kiel li sekve povas nei, ke hebreoj ekspluatas la aliajn? Ĉu oni ne rajtas kondamni movadon, kiu estas tiel reakcia kaj klerikala, ke al ĝia Universitato, scienculoj eĉ ne povas libere esplori la Biblion?

Finfine, kelke da vortoj pri "kontraŭdiro", kiun k-do Sonnenfeld opiniis trovi en mia artikolo. Unue mi estus riproĉinta al la cionistoj, ke ili celas apartiĝon en periodo kies ĝenerala tendenco iras "al pli kaj pli malvasta alproksimigo de la diversaj nacioj, forviŝante pli kaj pli la naciajn karakterecojn, al kunfando ekonomia, politika kaj lingva de ĉiuj nacioj de la tero", kaj poste mi estus konfesinta ke "la venontaj paŝoj de historio ne kondukos jam al forigo, sed al liberiĝo de la nacioj".

Pensanta homo ne povas trovi kontraŭdiron en tiuj frazoj. La tendenco pri kiu mi parolas en la unua frazo estas ĉie konstatebla, nerifutebla; ĝi estas tendenco al kreskanta *inter*naciiĝo de la mondo (atentu bone! *ne* al *sen* naciiĝo!). Kaj poste mi deklaras, en la alia frazo citita de k-do S., ke *sen*nacieco (atentu bone! *ne inter*nacieco) realiĝos nur en malproksima estonto. Sed la cionistoj estas eĉ kontraŭ *inter*nacia pensmaniero (mi ja tute ne postulas, ke ili estu sennaciuloj). En epoko kiu puŝas al internacia alproksimiĝo (ne en malproksima estonto!) la cionistoj volas apartigon, ilia movado estas anakronismo — jen kion mi diris. Ĉu la dua frazo kapablas malvalorigi tiun tezon? Tute ne!

Je la fino de sia kritiko, k-do Sonnenfeld skribas, ke ni ne povas riproĉi al cionismo, ke ĝi estas nacia movado kaj ni ne povas postuli, ke ĝi rekonu sennaciismon. Tion mi en mia artikolo neniam postulis. Mi ja ankaŭ ne postulas, ke Hindenburg, Poincaré aŭ Mussolini fariĝu sennaciuloj, Mi simple postulis, ke SAT-ano ne estu cionisto same kiel SAT-ano ne povos esti Hindenburgano, Poincaréano aŭ Mussoliniano. Ke cionistoj forĵetu naciemon kaj fariĝu SAT-anoj, estas certe dezirinde, sed por tion atingi, ni antaŭe devas prigardi por ke niaj SAT-anoj ne fariĝu defendantoj de ŝovinismo kiel k-do Sonnenfeld.

Lucien Revo.

[1]) "Sennaciulo" n-o 1 (53).
[2]) "Sennaciulo" n-o 50.

Al ĉiuj sinceraj unuecfrontanoj

Karaj kamaradoj!

Respondante vian alvokon, mi sendas al vi ĉi-kune artikolon "Al ĉiuj sinceraj unuecfrontanoj, kiun mi petas publikigi en la proksima n-o de "Senn.". Mi dezirus, ke viaflanke vi instigu la plej aktivajn k-dojn el ĉiuj tendencoj publike (sur la paĝoj de "Senn.") esprimi sian opinion pri ĉiuj punktoj, kiujn enhavas ĉi-tiu temo. Al mi ŝajnas, ke ĝi estas nun la plej grava, ĉar de ĝi dependas la ekzisto mem de nia asocio, kaj tial neniu aktiva k-do — des pli la gvidantoj de diversaj tendencgrupoj — rajtas silenti. Ĉiu diru malkaŝe kaj sincere ti-kion li opinias. Fratsaluton! *Sennaciule* (1334)

SAT en danĝero[1])

Jam delonge por neniu el la SAT-anoj estas sekreto, ke nia asocio travivas pli ol dum jaro daŭran kaj profundan krizon pro la intertendencaj frotoj, bataletoj kaj bataloj. Estis momentoj, kiam la vivo de SAT, kiel unuecfronta, proletara organizaĵo, estis en danĝero. Multaj k-doj kredas, ke nun, post la Wien-a kongreso, post la ŝanĝo de l' redakto de "Sennaciulo" la intertendenca paco estas restarigita kaj ĉio estas en la plej bona ordo.

Bedaŭrinde la efektiva stato de l' aferoj ne permesas akcepti tian optimistan opinion. Restas nekontestebla fakto, ke pluraj SAT-anoj forlasas niajn vicojn, ke la asocio perdas eĉ k-dojn, kiuj estis dum kelkaj jaroj ĝiaj gvidantoj kaj aktivaj konstruantoj.

[1]) Ŝajnas, ke k-do Z. troigas parolante pri danĝero, kiu liaopinie minacas nian organizaĵon. Estas ja fakto, ke kelkaj k-doj eksiĝis de kiam ekzistas TLES, sed tio ne signifas, ke la vivo de SAT estas en danĝero. Sed almenaŭ ni plene konsentas kun nia k-do pri tio, ke necesas larĝe pridiskuti la temon. Kredeble k-doj partoprenos la diskuton, kaj interkonsento certe okazos, ĉar ĉiuj sinceraj espistoj laboristaj deziras la unuecon. Pri fanatikuloj kaj malsinceruloj ni ne atentu!! *Red. Kom.*

Estus do erara kaj eble eĉ krima silenti pri tiaj faktoj, kiuj portas en si la danĝeron de ruiniĝo de la kun tia peno kreita kaj tiel progresinta proleta kulturentrepreno, kia estas SAT. Ĉiu SAT-ano devas tute klare prezenti al si la nunan staton kaj aktive partopreni en la "kuraco" de nia "malsanulo".

La kaŭzo de la krizo

Por kuraci malsanon necesas antaŭ ĉio forigi ties kaŭzojn kaj por forigi la kaŭzojn necesas ilin malkovri. Sed oni ne komprenu min en tia senco, kvazaŭ mi proponas serĉi la kulpulojn de la krizo. Certe, ili ekzistas kaj ne estus malfacile ilin trovi. Sed ĉu helpus al la afero tia esplorado? Mi tre dubas pri tio. Plie, ĝi nur pliakrigus la antagonismojn, ĝi pliprofundigus la krizon.

Ne la kulpulojn, sed la kaŭzojn serĉu ni. Kiuj do estas ĉi-kaŭzoj? Post serioza pripenso, post longaj konversadoj kaj korespondo kun pluraj diverstendencaj k-doj mi povas konstati, ke la ĉefa kaŭzo estas miskompreno aŭ nesufiĉe klara kompreno pri la veraj taskoj de SAT.

La taskoj de SAT

SAT estas unuecfronta kulturorganizaĵo laborista, kuniganta diverstendencajn proletesp-istojn por komuna laboro sur tiu kampo, kie tia kunlaboro estas necesa kaj ebla. La karaktero de ĉi-laboro estas ĝeneraltrajte skizita en la statuto de SAT. Necesas nun konkretigi la celojn de nia asocio, tute precize fiksi la limojn de l' kampo, sur kiu diverstendencaj proletesp-istoj povas kaj devas kunlabori, kaj labori unuecfronte sur ĝi, ne elirante ekster la limoj fiksitaj. Nur tiamaniere estas evitebla ĉio, kio povas enkonduki disecoĝermojn en la vicoj de l' SAT-anaro.

Samtempe la organiza strukturo de SAT devas esti tiel modifita, ke neniu grupo povu plendi pri oligarkio de aliu grupo. Konforme estas reorganizendaj ankaŭ la organoj de SAT.

"Sennaciulo"

"Senn." devas esti laborista gazeto informa. Laŭ sia enhavo ĝi tute ne devas imiti nacilingvan gazetaron (tion ĝi bedaŭrinde estis faranta lastatempe): ĝi ne enhavu ĵurnalistajn artikolojn politikajn, kiuj prezentas per si malbonan kopion de la granda gazetaro nacilingva. Por tio ni ne bezonas specialan esp.-lingvan organon. Se ni volas havi specialan organon, ni devas per ĝia specifa karaktero pravigi ĝian ekziston. "Senn." estu gazeto tute novatipa. Ĝi tute ne enhavu belvortajn artifikaĵojn de ĵurnalistoj. De la komenco ĝis la fino ĝi estu verkata de laboristaj korespondantoj. La ĉeftemo de l' artikoloj estu la konkreta, reala vivo de laboristoj en diversaj landoj.

"Senn." estas organo de unuecfronta organizaĵo kaj tial ĝi devas esti tute objektiva. Ĝi prezentu objektive nur faktojn. [1]) Komentojn politikajn, kritikojn, laŭdojn kaj mallaŭdojn ni ne bezonas (tion ĉiu el ni povas fari por si mem laŭ sia persona kompreno), des pli, ke tiaj "suplementoj" neeviteble estas ĉiam grandparte subjektivaj kaj pro tio ne povas utili al la plifirmigo de nia unuecfronto. Sed neniam estu rifuzata en "Senn." artikolo, kiu enhavas objektivan informon pri faktoj, eĉ se tiu informo povus ne plaĉi al kelkiuj.

Pri ĉio supredirita devas atente zorgi la intertendenca redakta komitato, kiu konsistas el bonvolemaj unuecfrontanoj fidindaj kaj sinceraj.

"Senn." enhavu ankaŭ SAT-rubrikon (informoj pri SAT-vivo kaj diskutejo) kaj kelkiam malgrandan esp-o-rubrikon (koncizaj informoj pri la "neŭtrala" esp-ista movado).

(Daŭrigota).

[1]) Pri tiu-ĉi punkto mi tute konsentas kun k-do E. Drezen, kiu diras: "Ne necesas, ke ni faru propagandon en SAT por niaj specialaj politikaj idealoj. Ni argumentu per faktoj. Ni citu sole la faktojn. La faktoj posedas mirigan econ de la klerigado, de la kulturigo." (Vidu "Senn.", n-o (53) de l' 1. XI. 25.).

SCIENCA KRONIKO

En Leningrad oni eksperimentis novan metodon de kuracado de "ventra tifo", kiu donis bonegan rezultaton. Dum ĉimetodo vakcino el mortigitaj tifaj baciloj estas inokulita en sangon de malsanulo. Post inokulado stato de la lasta baldaŭ pliboniĝas, deliro ĉesas kaj komenciĝas resaniĝo.

*

Rusa Doktoro Manuilov dum siaj eksperimentoj je mineraloj eltrovis, ke unu grupo el ili respondas kiel virinseksa. Tio signifas, ke mineraloj ankaŭ povas havi ian seksan distingon kaj pruvas proksiman parencecon inter bestoj, kreskaĵoj kaj mineraloj.

*

Urbo kun 51 lingvoj

En la plej loĝata urbo de Hindio, Kalkutta, estas parolataj 51 lingvoj: hindaj, aziaj kaj eŭropaj. Pleje ampleksas la bengala lingvo, uzata en la komercado kaj scipovata de 513000 homoj. Sekvas la hinda, adeptita de 365000, la urda, 80000, la gujarata, la asahma lingvoj ktp. La angla lingvo estas parolata oficiale de 50000 eŭropanoj kaj hindanoj. Ĝenerale tiu fakto ne estas miriga; konsiderante, ke en Hindio ekzistas pli ol 100 naciaj idiomoj. — Kaj en tia situacio la homoj interfratiĝu! —

Ĉi-liniojn entenis la "Korespondento por germanaj Libro-presistoj." Strange, ke la redaktoro ne per unu vorto mencias Esp-on, la solan interfratigilon. Sed estas konate: oni konstatas la fakton kaj tio sufiĉu.

E. M. (1072)

La Centra Komitato de RKP komunikas, ke la nombro da *aktivaj anoj* de l' KP en Sovetio atingis la 1. sept. 1925: 930701 ĉe tiu nombro estas 114990 virinoj.

*

Konsiliĝo pri Laboro kaj Defendo (Moskvo) asignis la unuajn monsumojn, necesajn por la preparlaboroj *Volga-Dona-Kanal*, kiu kunigas la basenojn de l' maroj kaspia, azova kaj nigra, kaj komenciĝos ĉe la urbo *Sarepto* (Volgo).

*

Klimato de Sibirio varmiĝas

Klimato de Sibirio mirinde ŝanĝiĝas. Okazas senhalta kaj malfacile klarigebla varmiĝo. Meza temperaturo de plej malvarmaj monatoj (decembro kaj januaro) rapide kaj regule kreskas kiel montras jena tabeleto:

jaro	januaro	decembro
1922	—27,4	—18,2
1923	—21,7	—16,2
1924	—18,9	—17,3
1925	—14,4	—

Oni atendas, ke meza temperaturo de kuranta monato decembro same devas esti ĉirkaŭ 16^0 aŭ 15^0. La tabelo montras temperaturon de Irkutsk, kiu lokiĝas ĝuste en geografia mezo de Azio 365 metrojn super marnivelo.

La varmiĝo ne estas okaza ĉar estas sistemeca. Same oni devas noti, ke blovoj de vento ŝanĝis nek direkton nek forton sian. Pro malvarmaj vintroj ĝis nun en irkutska gubernio oni povis kulturi neniajn fruktarbojn. Sed nun la afero ŝajne povas ŝanĝiĝi. Senfinaj spacoj de Sibirio, dronantaj en senlima oceano — arbaro, povas fariĝi facile koloniigeblaj. Ĝoju proletaro — estonta mastro de l' mondo!

*

Originala fiŝo de lago Bajkal

En lago Bajkal, kiu estas plejgranda en la mondo sensala lago, vivas tre interesa fiŝo nomata ruse *golomjanko*. La fiŝo vivas sole en Bajkal kaj nenie plu en la mondo. Ĝi havas tre kuriozan aspekton. Ĝia blanka korpo (ĉirkaŭ 15 c.) estas tute nuda, senskvama. Ĝiaj okuloj troviĝas en supro de kapo, brankoj — sur nuko. Ĝia buŝo estas ridige granda. La fiŝo tuta fluidiĝas, degelas kiel graso kiam ĝi trafas sur varman bordon, kies loĝantoj utiligas ĝin kiel ŝmiroleon por manoj. Ĝiaj latina nomo estas *Comephorus baicalensis*. Ĝia rusa nomo devenas de la vorto *gólomenj*, kiu signifas *mezan, profundan, seninsulan (nudan) parton de lago*. La fiŝo vivas malproksime de bordoj, en *golomenj*, nur en tre profundaj tavoloj de akvo kaj tial kutime elportas mirindan akvopremon.

Oni devas noti, ke la profundoj de Bajkal atingas 1370 metrojn kaj havas senŝanĝan temperaturon ĉirkaŭ 4^0 laŭ Celsius.

La fiŝo mortas tuj kiam ĝi trafas en suprajn akvotavolojn de la lago.

Maksim Krjukov

DIVERSAÎOJ

SAT-konferenco

La SAT-konferenco de Rejnlando-Vestfalio okazos 17. de januaro 1926, posttagmeze je la 1. en la sindikatejo (Gewerkschaftshaus), Essen, Kastanienallee.
Tagordo:

1. Referato de k-do Remers, Düsseldorf: "La laborista radio-internacio".
2. Referato de k-do von der Heid, Dortmund: "Ĉu klaskonscia laboristo estu ano de eklezio?"
3. Referato de k-do Stankeviĉ, Niedermertz: "La homa loko inter vegetaĵoj kaj lia devo".
4. Referato de k-do Schwenk, Essen: "Fundamentaj taskoj".
5. Diversaĵoj.

K-doj! Vizitu grandamase tiun konferencon! Kunportu laboremon!

SAT., Essen

Virino kiel prezidantino de Tuthindia Kongreso

Saroĵini Naidu, konata hindia poetino kaj verkistino, fervora agitantino de l' hindaj naciistoj, estas elektita prezidanto de Tuthindia Kongreso, kiu nun okazas en Hindio. Salendra Gos, membro de l' Unuiĝo de amikoj de libera Hindio deklaris, ke ĉi tio estas substreko de hindiaj postuloj liberigi virinon.

El ukrainlingva ĵurnalo "Visti", Chikago, Usono.

De l' redakcio. Kun ravo ni, SAT-anoj, observas tiel grandan kulturan kaj politikan progreson de Hindio. Tio pruvas, ke ankaŭ SAT-movado jam povas trovi en Hindio siajn fervorajn adeptojn. Do, ĉiuj SAT-anoj, kiuj povas havi rilatojn kun laborulaj hindianoj, penu por SAT-anigi ilin.

Sukcesa metodo por esperantigi partiajn organizaĵojn

Tre ofte ni povas legi pri diversaj varbaj kaj propagandmetodoj uzataj de niaj gek-doj. Tiel ankaŭ mi volas sciigi similan por alkonduki niajn varbantojn al taŭga vojo irenda por esperantigi kaj satanigi niajn partiojn kaj profesiajn organizaĵojn, kiuj ĝis nun ankoraŭ skeptike rigardas nian movadon.

Nia SAT-movado estas jam sufiĉe matura por liveri al la varbantoj kaj propagandistoj taŭgan kaj uzindan propagandmaterialon tiel mi interligiĝis kun kelkaj eksterlandaj k-doj, petante de ili aktualajn, politikajn raportojn, kiuj eble plej multe povus interesi niajn gvidantojn. Tiajn raportojn mi senlace tradukadis en ĉekan lingvon kaj alportis al la redakcio de nia taga gazeto, ofte oni forĵetis tiujn, sed de tempo al tempo tiaj raportoj ricevitaj pere de nia SAT-aparato aperis kaj tre interesis la legantaron, ke ili fine venis por demandi la redaktoron de kie venas tiaj raportoj. Tiu ĉi devis diri la veron t. e.: pere de Esperanto. Do ili finfine konvinkiĝis, ke esp. estas tre taŭga por la unuiĝo de l' "Proletaro Tutmonda", vidante, ke la skeptikismo de la gvidantoj jam malaperis, mi uzis ankaŭ propagandajn artikolojn, kiujn mi ĉiam aldonis al la raportoj senditaj redakcien. La redaktoro jam ne plu rifuzis publikigi ilin, ĉar rifuzinte propagandajn artikolojn li samtempe perdus la politikajn, kio domaĝus al li, kiu jam alkutimiĝis ricevi tian materialon interesan kiel ekz. la "Kiŝineva Proceso" el "Sennaciulo". Do li devis vole ne vole aperigi ĉion kion mi al li portis.

Kaŭze de tio la laboristaj k-doj legintaj konstante raportojn pri Esp. kaj per esperantajn konvinkiĝis pri bezono de Esp. kaj komencis pripensi, meditis por la mondlingva afero, unu demandis alian koncerne E., kian signifon ĝi havas por revoluciulo ktp. ofte dum kunvenoj okazis debatoj pri E. kaj SAT sed mi silentis, la afero mem evoluis, nur al apartaj k-doj mi klarigis E. kaj SAT, kaj tiuj transportis la klarigojn pluen; tiel ke preskaŭ unu klarigis al alia ĝis fine mi vidis kaj konstatis la entuziasmon jam sufiĉe matura, mi decidis publike paroli pri ĝi. — Sekcio de ruĝaj metallaboristoj en Plzen (Pilsen) aranĝis kunvenon, dum kiu mi proponis la aranĝon de E.-kurso de la ruĝa sekcio. La gvidantoj mem preskaŭ parolis el mia buŝo kaj kion rekomendas gvidantoj oni ordinare plenumas, ankaŭ tiel okazis, disvolviĝis larĝa debato pri SAT kaj Esp. kaj mi estis devigita por ĉion klarigi, postuli apartan kunvenon, kiu nur traktos pri Esp. kaj SAT. Entuziasmo grandega regis, kiam mi diris, ke sovetregistaro pere de radio sendas E.-paroladojn. La sekcio decidis aranĝi nepre E.-kurson kun antaŭa kunveno de ĉiuj interesatoj, kie iu k-do aranĝos paroladon, tio verŝajne ankaŭ baldaŭ plifortigos nian SAT-movadon. La gek-doj provu imiti la metodon, eble ankaŭ ili sukcesos.

Pilsen (409(

Rim. de l' redakcio. — Kun ĝojo ni akceptis kaj presigas tiun raporton. Ĝi pruvas, ke fakte nia peresperanta laboro estas plej efika poresperanta agitado, kaj samtempe ni servigas, laŭ nia fundamenta celo, nian lingvon al la proletaj organizaĵoj. Imitenda ekzemplo. Do ni petas vin, plej atenti la alvokon de la proleta presservo peresperanta en antaŭa numero, kiu alcelas organizi tiun laboron internaciskale.

KRONIKO

Ĉekoslovakio

Gablonz (Neisse). La ĉi-tiea Lab. Esp. Grupo ricevis, post energiaj penadoj kaj pledoj, flanke de la kom. frakcio de la komunumo subvencion de kĉ. 500. (La urba parlamento konsistas el 4 komunistoj, 2 socialdem. kaj 36 burĝoj). Imitinda ekzemplo por grupoj en aliaj urboj kaj lokoj.

Francio

Marseille. Post tro longa dormado, la SAT-anaro denove revekiĝas. La laborgrupo kunvenis 7. dec. por la renovigo de la estraro. Estis elektitaj kiel helpsekretario k-do Vabre Achille kiel helpsekretario k-do Ferrero Emile kaj kiel kasisto estis reelektita nia sindona k-do Rousse. Formiĝis tuj SAT-ana sekcio, kiu entenas 15 kamaradojn. K-don Ferrero oni elektis kiel peranton. Jen la adreso de tiu kamarado. Ferrero Emile, taglaboristo, 20 Rue des Convalescents Marseille. Ĉiuj SAT-anoj turnu sin al li por eventuala sciigo. Vigla propagando estos de nun farita por instigi la antaŭenemulojn lerni Esperanton, fariĝi SAT-anoj, kaj kreskigi la Marseille-an grupon tiel, ke ĝi baldaŭ superu la Lyon-an grupon. Tiel la lyonaj k-doj konstatas, ke ilia sekvinda ekzemplo estis fruktodona.

SAT-ano 1255

Holando.

Amsterdam. "De Tribune", krom la jam raportitajn de Karotam ĉiutagajn komunikojn, nun ankaŭ sabate enpresas kurson, gvidatan de k-do Nutters. Due: Ni ĝajnas terenon ankaŭ ekster Amsterdam: du novaj anoj en *Haarlem*, kiuj klopodos rekolekti la membrojn de la iama sekcio de NFLE, kaj fondi se eble SAT-grupon. Trie: Wormerveer-a grupo de la Ned. Fed. de Lab. Esp-oj hodiaŭ vespere likvidacios. Nia k-do Woud en Wormerveer, la gvidinto de la grupo esploros la eblecon de fondo de SAT-grupo! Kiel vi scias ĉiuj anoi de nia grupo povas je kosto de la grupo, aliĝi al SAT, rezultato estas 11 novaj membroj en Amsterdam.

SAT-grupo en januaro komencos kurson por infanoj de ludĝardena asocio. Krom tio du kursoj por plenaĝuloj estas tenataj, el kiuj unu laŭ Petro. Ĵurnalo de Kompartio "Tribune" ĉiusabate havas kurson en Esperanto, gvidatan de k-do Nutters. **En Amsterdam estas striko de stukistoj. Oni klopodos varbi stukistojn germanajn por "rompi" la strikon.**

Jugoslavio

Split. Jugoslavaj SAT-anoj interkonsentis kaj decidis pli sisteme kaj pli akorde ol ĝis nun propagandi SAT-ideon, servi al la klasbatalo kaj vere informadi eksterlandon pri cirkonstancoj de tiu ĉi malfeliĉa terpeceto. En tia ŝtato multnacia, en kiu popolaj demagogoj komercas kun nacia unuiĝo, SAT-anoj devas esti, pli ol ĉiuj, interligitaj kaj unuanimecaj en unuigado de la laborantaj popoloj kontraŭ iliaj ekspluatantoj kaj nacisubpremegantoj.

La 16. de tiu ĉi monato k-do M. D. el Splito ricevis de la SAT-kooperativo menditajn librojn, sed la pakaĵo estis disvolvita ĉe la poŝto, kaj li tuj enkarcerigita. Post kvar tagoj de terura suferado da malvarmeco kaj malsatego li estis liberigita. Enkarcerigita de policestro kiel komunista propagandisto, kaj de ekzamenanta juĝisto forlasita, ĉar "ne havas sencon plu retenadi lin". Tia estas la situacio en Jugoslavio, sed tamen, la batalantoj sulkigas sian sulkon spite al ĉio! — kiel diris Karlo Liebknecht.

Jugsalkor.

Litovio.

Kaunas. Ni jam regule ricevas "Sennaciulon" kaj "Sennaciecan Revuon". Nia presorgano nun pli kaj pli interesigas niajn kolegojn-studentojn. Kelkaj niaj kolegoj-socialistoj komencis lerni Esp. kaj legi Sennaciulon. Precipe ilin ekinteresigis malgranda sciigo en "Lietuvos Zinios" — Litovaj Sciigoj aŭ Novaĵoj (taggazeto de plej granda opozicia partio en Litovio, de vilaĝanoj-popolanoj) tradukita el "Sennaciulo" pri okazintaĵoj en Litova universitato. En popolkleriga ĵurnala (socialista) "Kultura" mi kelkfoje trovis tradukaĵojn aŭ eltiraĵojn el "S-ulo" aŭ "Senn. Revuo". Do litovoj pli kaj pli ekscias pri SAT-ana Organizaĵo. nia kolego Karosa, kiu estis pro okazintaĵoj en Universitato enkarcerigita, en malliberejo eklernis Esp-on kaj eksciis pri S-ulo. Tie Esp-on gvidas unu kamarado kaj li havas grandan sukceson.

Sovet-Unio.

Kievo. La 28. de novembro dum ĉiusemajna kluba kunveno de esp-istoj vigle pasis raporto pri Ido. Bedaŭrinde promesinta ĉeesti ĝin idisto ne venis.

La 1. de decembro ĉe Ŝtataj Esperanto-Kursoj ekfunkciis literatur-historia rondeto por studo de originala esp. literaturo. La rondeto laboras laŭ laboratoria metodo.

En februaro 1926 dum Kieva "kontrakta" foiro estas aranĝota ekspozicio "Esperanto kaj komerco". Ni petas ĉiulandajn kamaradojn sendi por la ekspozicio diversajn foliojn, prospektojn, reklamilojn ktp. laŭ la adreso: SEU-fako, Kiev (Ukraino), str. de Lenin 32, 23. — La 19. de decembro ĉe Ŝtataj Esp. Kursoj okazis ekzameno de supera grupo (meza inter la elementa kaj la pedagogia). El 10 ekzamenitoj 8 kontentige plenumis la ekzamenon kaj rajtas eniri pedagogian grupon. Inter la sukcesintoj estas la gesatanoj: k-dinoj Ajnbinder (5628), Brusilovska (5519), Ĥazina (5657), Landa (4749) kaj k-do Vail (5656).

728

Kojdanovo. Estas organizita esp-a kurso en ĉi-tiea pola lernejo (Sovet-Unio, Blankrusio, Minskij Okrug, Kojdanovo, Polskaja Ŝkola), kiel aparta sendeviga objekto Esp. lernas 25 geknaboj. Ilin plej forte interesas la ebleco de inter korespondado kaj interŝanĝo kun lernantoj de la tutmondo kaj pri tio ili petas ĉiujn lernejajn esperantajn kursojn.

Pskov. Lokaj esp.-istoj rekomencis esp. laboron. Dum septembro - novembro estis tri raportoj pri Esp-o. Jam estas organizitaj kursoj de Esp-o: 1.) en klubo de sovetkomercservistoj de nomo de k-do Tomskij 20 pers., 2.) fabriko "Ŝpagat." (La Ŝnuro) 15 pers., 3) en gubernia Terkultura Fako 15 pers. kaj 4) ĉe la ĉelo de Komjunularo de Termezurista Teknikumo 20 pers. Estas esperoj, ke estos organizitaj esp. biblioteko el libroj de esp-istoj, kaj murgazet. Oni supozas fondi gub. Fakon de Esp.

La dezirantoj ricevos pri urbo mem, industrio, profesia, laborista kaj kluba vivo ktp. Skribu al supre menciitaj rondetoj. La lernantoj volas korespondadi kun eksterlandaj k-doj. La respondo estas garantiita. *SAT-ano (5353)*

Saratovo. Ekgrupiĝis malgranda esperantmora rondeto, kiu eldonas manskribitan ĵurnalon "Saratova Rondiranto". Partoprenas dume 8 esperantistoj precipe SAT-anoj. Eliras 2. n-o. Gvidas rondetan laboron k-doj: Kuŝkov, B., Sajapin, A. kaj Koŝelev, A. "Saratova Rondiranto" havas 3 tendencojn: pri nova esperanta revolucia religio, pri klasa laborista batalo, kaj pri sennacieco.

En Saratovo ekzistas 3 knabetoj, kiuj ricevis neniun bapton kaj oficiale havigis esperantajn nomojn: Stelverd' Sajapin, 2 jaraĝa, Ribel' Sulje, 3 monataĝa kaj Malmort Sajapin, 13 tagaĝa. Nia esperantmora rondeto estas zorganta nun pri kreo de la esperanta sennacieca rito de la infana bapto. Ni petas ĉiujn SAT-anojn, kiujn interesas la demando, skribu al ni viajn opiniojn pri la sennacieca bapto-rito. Ni antaŭe dankas ĉiujn, kiuj bonvolos sendi al ni la ŝatatajn montrojn kaj konsilojn pri la demando. Sendu viajn proponojn pri la bapto-rito al k-do Sajapin, A., laŭ la adreso: *Rusio, Saratovo, str. Respublika d. n-o 28 loĝ. 6.*

En estonto nia rondeto supozas inviti unu alilandan esperantiston (aŭ ino), tute ne sciantan rusan lingvon, por page edukadi esperantlingve niajn esperantistojn. Kiu deziras transloĝiĝi en Saratovon por tiu ĉi celo skribu al ni.

SAT-ano n-o 2985.

Vladimir. En loka regimento de l' ruĝa armeo ekzistas de novembro esperanta rondeto, en kiu okupiĝas 24 k-doj, preskaŭ ĉiuj vicaj ruĉarmeanoj. Ĉiuj kamaradoj esprimas deziregon en estonto aliĝi SAT-on kaj havi eksterlandan interkorespondadon, precipe kun esp-istoj militservantoj. Nia kom. ĉelo ankaŭ tre dezirus, kun helpo de esp-istoj, kuniĝi kun ia eksterlanda ĉelo. Unu roto de l' regimento, en kiu troviĝas multaj anoj de esp. rondeto jam irante vicare kantadas esp-ajn, revoluciajn kantadojn ("Forĝistoj ni", "Ruĝarmeaniĝo" kaj aliajn). Komandon oni donas ankaŭ esperante. Skribu laŭ adreso: Vladimir, N. Obrazcovij polk al esp-a rondeto.

N. Korolev (5368)

Verku pli koncize viajn raportojn.

Vintro

Ventegas. Malvarma vento. Griza la ĉielo. Kaj krepusko dum la tuta tago.

Iumatene la ŝanĝo. Blanka tuko kovras la teron. La arboj kaj bariloj estas kvazaŭ pudritaj. Sur la tegmentoj estas nevidigate la tuta tegolaro. Kaj ankoraŭ la neĝeroj tradancas la aeron. Senkompate ili fiksiĝas sur ĉio, estanta eksterdome.

La proletoj plirapidigas la paŝojn al la laborejo. Ili sentas malagrable la malsekecon tra la malfirma vesto. Kaj kelkies vizaĝo, montranta ĉiam esprimon de plej ega sufero, ekŝajnas pli serioza ankoraŭ. — Vintro pliiĝo mizera!

De tago al tago pliiĝas la malvarmo. Ĉifonvestita virino tiras veturileton tra la strato, entenante karbon. Devas esti iom por ne mortfrosti, ŝi diras alparolate de konatino. Samtempe veturilego estas antaŭ belega vilao. Konstante kelkaj viroj endomigas korbon post korbo plenkarban. La okuloj de l' virino sopireme rigardas. Kaj momenton ŝi enpensiĝas varmajn hejmojn, kie neniu sentis la akrecon de l' vintro. Tiam ŝi plutiras, tien, kie la fenestroj estas dense glaciumataj kaj tusado aŭdiĝas de malsane vegetantaj homoj. —

Nepreta konstruaĵo. Malvarma vento blovas tra la nudaj lokoj. La laboristoj videblaj tie nun senlabore vagas en la vintra malvarmo. —

Frosttremantaj stratbalaistoj. De tempo al tempo ili svingas la brakojn en la aero por malridigigi la sensangajn korpomembrojn.

En la larĝaj stratoj de l' interna urbo homamasoj interŝoviĝas. Elegante vestitaj gesinjoroj. Hundeto zorge envolvita kelkfoje trotas apude. Kaj inter ili iuj penas disflankigi la neĝon. Ĝi ja tre ĝenas la moŝtojn. — Iu falas. Insultoj eksonas: "Skandalaĵo! Kiel senskrupule oni laboras!" —

Tintado aŭdiĝas. Rasaj ĉevaloj. Lukse ili estas ornamitaj. En la glitveturiloj sub feloj komforte sidas homoj. Kontente la okuloj el la sanaspektaj vizaĝoj ĝuas la stratan bildon. Kaj aliaj, ŝovantaj pene ĉareton rapide cedas flanken.

La kafejoj estas plenokupataj. Agrabla varmo miksata kun la bonodoro de kafo fluas el ili. Almozpetuloj surtere sidas ĉe l' pordoj. Ili sentas la varman aeron kaj flaras la kafon. Kelkiam iu ĵetas kupromoneron en la ĉapelon kun konvinka mieno de sia bonfaremo. La aliaj plenkonscias, ke donacoj ja nur plinombrigas tiajn sentaŭgulojn.

Altaj fenestroj de grandmagazenoj. Malantaŭe varmiga vestaro. Homoj enkaj eliras. Sed ĉiuj bonstataj. La proleto plue devas porti ĉifonojn. Neniu atentas ilin. Nur la vintra morto kompateme iafoje elsuferigas la plej grandajn viktimojn de l' socio, fosante al ili molan tombon en la neĝo. — Sed varmaj hejmoj de l' riĉuloj, zorge envolvitaj hundoj, okupataj kafejoj kaj plenvaraj magazenoj. — —

— — — — — — — — — — — —

Suno de l' printempo! Leviĝante por silentigi la vintran ventegon kaj krevigi la glacion, penetru ankaŭ en la cerbojn de l' homoj degelante la glacion de kiu estas ĉirkaŭata ankoraŭ kelkies konscio.

E. Meyer (1072)

SUPLEMENTA PAĜO AL
"SENNACIULO"
N-o 5 — 17. DEC. 1925

LA LERNANTO

Nur tiu meritas liberecon kaj la vivon, kiu konstante per batalo devas akiri ilin.

La ĉevalvetkurado

Vera historio.

Du amikoj, Levi kaj Cohn, vojaĝis per fervojo tra Polio. Survoje Levi diris: "Cohn, mia amiko, jam longtempe ni vojaĝas, tio nun komencas fariĝi enua. Ĉu ni ne povas ludi ion? Sed ni posedas nek kartojn, nek ludkubojn." — "Sennecese Leviĉjo", respondis Cohn, "ni tamen povas ludi; ni ludu ĉevalvetkuradon." "Sed Cohn, ĉevalvetkuradon tie ĉi en la kupeo? Ĉu vi estas freneza?" "Paciencigu vin, Leviĉjo, ni nun preparos ĉion, kion ni bezonas por la ludo. Atendu, komence ni faru la hipodromon." Li prenis ruĝan krajonon kaj faris du dikajn liniojn en interspaco de unu metro sur la benko. "Vidu nun nian hipodromon, tie estas la starto, tie estas la celo. Nun ni iras en la "ĉevalejon", en nian "marstalon" por elekti bonan kurĉevalon".

Cohn malfermis la vestaĵon kaj tenis sub la ĉemizo. Post longa serĉo, li eltiris "ĉevalon kun ses piedoj." "Vidu, Leviĉjo, estas ĉevalviro. Ĉevalviro havaŝ varmegan temperamenton, li estas bona kuranto, li certe gajnos la kuradon." — Admirinde Levi vidis tion kaj diris senkuraĝe. "Nun ankaŭ mi iras en la ĉevalejon, certe ankaŭ mi trovas ĉevalon". Li pli longe serĉas ol Cohn. Fine li eltiris belan, blankan "ĉevalon". "Vidu Cohn, estas ĉevalino. Ĉevalino nome ne estas temperamentema, sed ŝi posedas persistecon, tio estas bona emo por ĉevalo." "Kia estas ĉevalino" pensis Cohn, sed li diris: "Ni nun havas ĉevalojn, nun ni komencu la kuradon. Al la starto." — Ili metis siajn ĉevalojn al la starto, Cohn kalkulis: Unu, du, tri kaj la ĉevaloj kuris. Komence, la ĉevalviro, per varmega temperamento bone kuris kaj baldaŭ li gajnis grandan profiton pri la ĉevalino. Cohn, feliĉega pri tiu ĉi sukceso plifoje ekvokis: "Antaŭen, antaŭen Herkulo, la celo ne estas plu malproksima". Sed kiel ofte en la vivo, tiel ankaŭ nun: La persisteco venkis pri la temperamento. La fortoj de la ĉevalviro baldaŭ laciĝis kaj la distanco inter la du ĉevaloj fariĝis pli malgranda. Nun Cohn elektis aliajn vortojn por stimuli sian ĉevalon: "Ĉu vi volas antaŭen, vi fiĉevalo!" Ofte li levis la manon por puni la Herkulon, sed tiu ĉi estis malpermesita. Malrapide sed certe la ĉevalino de Levi regajnis la perditan distancon kaj fine, per tri ĉevallongoj, ŝi faris la kuradon. "Hura venko!" elvokis Levi, "mia 'Monna Vanna' gajnis la grandan premion. Cohn, amiko, mi bedaŭras, tio kostas kvin markojn." —

"Sed mi postulas rekompencon", protestis Cohn, "mia Herkulo ne konis la hipodromon, ĝis nun li nur kuris sur mola fundo." — La dua kurado komenciĝis. Herkulo, simile kiel ĉe la nuna kurado, komence bone kuris, sed alveninta en la mezo, li haltis. — "Bedaŭrinde amiko, tio ankaŭ kostas kvin markojn." Cohn koleris. "Antaŭen Herkulo, la lasta kurado kostas la honoron de mia marstalo." Sed Herkulo ne volis plu kuri, liaj fortoj estis elĉerpitaj. Malrapide, sed persiste 'Monna Vanna, atingis la celon. Levi enmetis la dekkvin markojn, tiam li aminde prenis sian ĉevalinon kaj metis ŝin sub la ĉemizon. "Monna Vanna, vi estas bona raso, vi nun fariĝas la patrino de mia marstalo". Cohn, per unua pugnobato mortigis la belegan Herkulon. "Fiĉevalo mizera! Tio okazis al mi maljuna sporthomo. Kiam mi alvenos al Varŝavo, senprokraste mi aĉetos novan rasĉevalviron por nobligi mian marstalon."

M. Schmidt, Mannheim.

Pro nur unu dolaro

Mia mono estis for, vere, sen centimo mi staris sur la strato en Denver en la ŝtato Kolorado. Neniu volis dungi min. Mi provis ĉion. Ĉion mi frapis, mi kuregis, perdis preskaŭ miajn krurojn. Sed ĉie estis dirita: "Ni ne bezonas vin."

Fine mi renkontis bestejan posedanton, kiu vizitis ĉiujn urbojn de la nordamerika okcidento. Li bezonis viron, kiu povis fari "ĉion". Mi estis lia viro, ĉar la malsato reflektis el miaj okuloj — mi devis, ĉar mi ne havis alian elekton. Sed kion li proponis al mi; tiu fripono estis tro malica eĉ por Ameriko; mi devis esti enkudrita en haŭton de tigro, poste iranta en kaĝon al vivanta leono. Lia malfalsa tigro mortis. Sed li estis anoncinta ĝin, do li devis montri tian je ĉia kosto. La fripono mensogis, ke lia leono estas maljuna, apatia, duone blinda kaj tiom bonnutrita, ke ĝi eĉ ne turnos sin por rigardi min.

Mi ne havis sufiĉan kapablon anstataŭi tigron, rezignis longtempe, sed la fino de la kanto, ke mi estis preta eniri la kaĝon pro nur unu dolaro. Promesite, farite. Depost tiam mi scias, kion signifas timego. Kiam oni estis kudrinta min en la felon, mi estis ŝovita en la kaĝon. La rigardejo estis okupita plene kaj la popolo el Denver alĝojegis min, kvazaŭ mi estis fame konata aktoro, tamen mi nur estis malsata kaj timega.

Unue la leono ne moviĝis, sed fine ĝi levis la kapon kaj skuis la hararegon. Ĝi estis belega besto; poste ĝi ekstaris kaj alkuris min. Mi fermis la okulojn, mi volis krii, sed mi ne povis. Ŝajnis al mi, kvazaŭ mia gorĝo estis firmŝraŭbita; mi ne kapablis ekaŭdigi min. Se mi ankaŭ ne vidis ion, tamen mi aŭdis ĉion. Mi aŭdis, kiel alproksimiĝis la infera bestego. Mi aŭdis, kiel ĝi murmuris, mi aŭdis la mallaŭtan sonadon de ĝiaj piedegoj sur la planko de la kaĝo, kiel ĝi vipis al si la flankojn.

Iom post iom ĝi alproksimiĝis, ĝi jam estis tre proksime ĉe mi, mi sentis, ke ĝi tuŝis min per ĝia piedego, mi sentis ĝian varmegan spiron kaj — mi aŭdis, kiel ĝi flustris al mi: "Ĉu la fripono ankaŭ al vi nur donas unu dolaron?"

Tradukis el germana *(1378)*

Laboristoj

Moiseo Nadir

La laboristoj. Ĉion ili aneksas. Kien nur vi vin turnas — estas ili. La mondo estas plena je la deŝiritaj ĉifonvestitoj. Ili disvastiĝas ĉiam pli kaj pli tra la tuta terglobo. Por la nobela, por la nelaboranta homo kun aristokrata sango, baldaŭ mankos loko. Kien vi iras kaj kie vi staras, renkontas vi nurajn laboristojn. Ili okupas ĉiujn lokojn sur kaj sub la tero kaj la aristokrata la *ekskluziva* homo kun la alta ĉapelo devas stari kaj rigardi. Rimarku nur. Ĉiuj plej bonaj lokoj en la karbminejoj, estas okupitaj de laboristoj. Ĉiuj altaj tegmentoj de nefinitaj domoj estas aneksitaj de laboristoj. Ĉiuj vagonarfabrikoj estas plenaj de ili. Kaj eĉ sur la batalkampoj *kie oni okupiĝas per fabrikado de favora patriamo kontraŭ la malamiko,* ankaŭ troviĝas grandega amaso da laboristoj. Kaj eĉ la metalfabrikoj estas plenigitaj de simplaj laboristoj. Ĉie ili estas. Kien vi fiksas rigardon — *nur laboristoj kaj laboristoj.* En la subteraj vagonaroj. En la sulfurfabrikoj. Sur la kampoj. Sur la finaĵoj de plej altaj konstruaĵoj. Sur la ŝipoj kaj *sub* ili. Eĉ sur la ankoraŭ nefinitaj pontoj rampadas ili. Eĉ en kanaloj kaj defluiloj ili troviĝas. Ĉie, ĉie, estas nur laboristoj kaj laboristoj. Kaj ĝuste tiam *kiam vi kuŝigas vian kapon sur la silkajn kusenojn kaj volas dormi,* sonoras li ie per martelo, aŭ li bruas per hakilo, aŭ li boras per borilo, aŭ li defalas de sur alta konstruaĵo kaj eldonas ne kulturatan krion. Abomena anaraĉo — la laboristoj.

El la juda *M. Tuler*

Humoro

Al Rotŝild venas pola judo petante pri iu okupo. Ĉio estas okupata. Tiam proponas la judo al Rotŝild, ke li fariĝos lia konsilanto. — Bone tiam mi vin akceptas. Vi ricevos 1000 kr. gaĵon (monata salajro). Monatoj jam pasis kaj la judo ankoraŭ eĉ ne movis la fingron. Konfidanto pri tio atentigas Rotŝildon, kaj tiu vokas la judon riproĉante al li, ke li ĝis nun nenion, tute nenion faris. Ho mi petas, mi estas via konsilanto, sed vi ĝis nun ne demandis de mi konsilon. — "Jes, vi estas prava" diras Rotŝild kaj cerbumas promenanta en la ĉambro. Fine li haltigas kaj diras al la judo: Do konsilu al mi, kiamaniere mi povus vin deskui (perdi).

Presejo: UNS-PRODUKTIVGENOSSENSCHAFT, LEIPZIG